

Santeni vian vivradikon

Ĉu vi volas sanon?

Ĉu vi volas vivlongecon?

La respondoj estas“!”

La sano kaj vivlongeco estas senprezaj riĉaĵoj al ĉiuj vivantoj.

Por tiuj,oni ĉiam esploras kaj praktikas.

En multaj landoj,ĉiumatene oni penas sin ekzerci,longe kurante aŭ farante gimnastikon ktp..

En restoracioj,oni zorgeme elektas konvenajn menuojn aŭ dietojn,tonikumante korpojn per iuj nutraĵoj.

Ĉu ekzistas aliaj taŭgaj teorioj kaj ekzaktaj metodoj por santeni kaj vivlongigi?

Eble la ĉinaj antikvaj saĝoj kaj spertoj inspiris nin.

Se oni komparas homkorpon kun unu arbo,kiel ni faros porĝi?

Kian parton de la arbo ni devas prioritare prizorgi aŭ nutri?

Folion,branĉon,trunkon aŭ radikon?

Por solvi tiun problemon,mi diskrete rekomendas la TĈM-an teorion pri“vivradiko”kaj entuziasme proponas “**santeni vian vivradikon**”.

Pri la arbo,oni pli bone konatiĝas.

Eĉ la infano plej defrue havis impresojn pri ĝi sur koloraj bildoj aŭ en la naturo.

La arbo konsistas ĉefe el la radiko,trunko,branĉo kaj folio ktp.,inter kiuj la radiko estas primara kaj grava parto.

La radiko estas primara parto,el kiu la arbo elkreskas.

La radiko estas grava parto,kiu diskreskas profunden en la tero por firmigi la arbon kaj liveri nutraĵon al ĝi.

La radiko havas la plej intiman rilaton kun la tuta arbo.

Se la radiko malsaniĝas,tio baldaŭ malsanigos la tutan arbon.

Ĉu la trunko,branĉo aŭ folio ludas tiujn gravajn rolojn?

Eble ne.

Se la homkorpo figuriĝas kiel la arbo,ĉu ekzistas la“radiko”de la homkorpo,kiu ludas tiajn rolojn?

Se ekzisti,tio estas esplorinda.Ĉar vivradiko de homkorpo estas tiel gravaj en malsaniĝo,resaniĝo,santeno kaj vivlongiĝo.

Feliĉe,la respondo estas“jes”, laŭ la tradicia ĉina medicino (TĈM) .

La teorio pri la“vivradiko”de TĈM formiĝis antaŭ miloj da jaroj,kaj ĉiam direktis klinikan praktikadon.

Tra studado kaj esplorado dum duon-jarcento,ĉinaj medicinsciencistoj jam akiris ĝenerale aprobatan atingiĝon en la ĉina medicina kampo.

Ili eltrovis la materialbazojn (organ-hist-sistemon) de“vivradiko”kaj ĝiajn homologecajn rilatojn kun MM en la anatomio kaj fiziologio ktp.,kiuj reale ekzistas kaj funkcias kiel TĈM esprimis.

Nature oni eble demandas, kiu parto el homkorpo estas la“vivradiko”.

Kiu organo aŭ histo el homkorpo laŭ TĈM?

Antaŭ malkovri tiun enigmon,ni simple informiĝu pri TĈM.

La unua parto

La rakontoj pri TĈM

Kio estas TĈM?

TĈM estas la “tradicia ĉina medicino”.

TĈM estas unu medicina scienco kun la kompleta teorisistemo.

Ĝi posedis la historion pli longan ol MM kaj favore donis gracojn al la popoloj tie, kie tiam ekzistis la granda lando en la mondo.

Bedaŭrinde, TĈM-aj disvolviĝaj historioj ĉefe okazis en la antaŭa Ĉinio, tio ŝajnas nebuligi ĝiajn pompaĵojn por multaj nuntempaj popoloj en la mondo.

Menciante TĈM, eble multaj fremdlandanoj nur havas impresojn pri la akupunkturo.

Tamen ili ne konas, ke en la granda scitrezorejo de TĈM, ekzistas la aliaj diversaj brilantaj gemoj, juveloj kaj diamantoj ktp., kiuj malfacile taksigas per la prezo.

La brilaj kaj miraklaj historioj de TĈM.

Kial ni tiel taksas TĈM?

Nun lakone skizu TĈM-an disvolviĝon per iuj rakontoj.

TĈM formiĝis antaŭ ĉ. 2000 jaroj en la antikva Ĉinio. En la longa historio, ĉinaj popoloj suferis el sennombraj mizeregoj.

Senbridaj naturaj katastrofoj kiel inundoj, trosekecoj, lokust-katastrofoj ktp. plagis ĉinan vastan landon.

Fatalaj epidemioj aŭ infektecaj malsanoj kiel ĥoleroj, pestoj, tifoj, tuberkulozoj, rabioj, morbiloj, skarlatinoj, antraksoj ktp. senkompatate plagis ĉinajn popolamasojn.

Elmilitaj pulvfumoj kaj armlifrapaj sonegoj vualigis sur la ĉina vasta tereno, kaj elbatalaj vundoj kaj traŭmatoj feroce plagis ĉinajn popolojn.

Tiuj plagoj kaŭzis al ĉinaj popoloj mizerojn kaj feblecojn, malsaniĝemojn kaj dolorojn, sandamaĝojn kaj vivforpreojn.

Sed tiuj neniam pereigis ĉinajn popolojn kaj inverse akcelis la naskiĝon de unu granda medicino en Ĉinio.

Furioza plago de tifo tiam akcelis aperojn de la famega medicinisto **Zhang Zhongjing** (ĉ.p.K. 150-219) kaj lia verkego, la “**Traktaĵo pri Tifo kaj Diversaj Malsanoj**”.

El tiam, la tifo komencis deteniĝi kaj neniam furiozis en Ĉinio.

Ankaŭ plue la “**Traktaĵo pri Tifo kaj Diversaj Malsanoj**” kreece kaj sistemece establis la novajn teoripensojn por diagnozi kaj kuraci aliajn sindromojn kaj malsanojn, kiuj formis unu gravan parton de la teorisistemo de TĈM.

Tragediaj damaĝoj de militoj urĝis sursceniĝon de la famega kirurgo **Huatu** (ĉ.p.K. 145-208) kun lia “**Mafeisan Pulvoro**”, eble la plej frua pulvor-anestezanto en la mondo.

Per tiu pulvoro, **Huatu** skrapis brakoston de ĉefgenenalo **Guanyu** (ĉ.p.K. 161-220), la ĉina famega militisto por forpreni sagtokson, kaj tiam li estis ĝoje ludanta ĉinan ŝakon preskaŭ sen dolorsento.

Eĉ se historioj aŭ anekdotoj estis la supre rakontitaj, ili jam profunde populariĝis inter ĉinaj popoloj kaj jam fariĝis la simboloj de pompaĵoj de TĈM kaj la fieroj de ĉinaj popoloj al ĝi.

TĈM reale kreis la pompaĵojn kaj miraklojn por medicinaj historioj de la homaro, kiuj ŝajnus jam malproksimiĝi.

Kiel TĈM fartas nuntempe?

Ankoraŭ juna kaj vigla TĈM

TĈM ankoraŭ malavare dediĉas la sanon kaj vivon al ĉinaj popoloj kaj mirakle alportas unu grandan noveraan donacon al popoloj en la mondo.

Tiu donaco estas artemisinino ekstraktita el la drogherbo, unujara artemisio (artemizio, *Herba Artemisiae Annuae*).

Artemisinino sukcese solvis mond-skalan problemon de MM en la mondo.

La esplorgrupo esplori artemisininon estis ĝuste la profesiaj esploristoj de *Ĉinia Akademio de Ĉinaj Medicinaj Sciencoj*.

La tutviva esploristino *Tu Youyou* kaj ŝia esplorgrupo ankaŭ havis la repagon: *Nobel Premio* aljuĝata al ili en oktobro de 2015 pro ilia eminenta kontribuo al la monda medicino kaj homara sano.

Kial ŝi turnis siajn rigardojn kaj atentojn fokuse al unujara artemisio el sennombraj drogherboj kaj iliaj kemiaĵoj ktp.?

En multaj instrulibroj pri TĈD (tradicia ĉina drogo) ktp. ĝenerale ekzistis la klara priskribo ke “unujara artemisio povas haltigi malarajn paroksismojn kaj dispeli astenian febron ktp”^[1].

Multaj kuracistoj de TĈM konis klare tiun efikfunkcion de unujara artemisio (artemizio).

Tamen kial nur esploristino *Tu Youyou* kaj ŝia esplorgrupo akiris tian miraklon?

Kia inspiro al ŝi alvenis kaj faris ŝin sukcesa?

En la antikva verko de TĈM “*Postkubuta (Enpoŝa) Receptaro por Urgaj Savoj*” (肘后备急方) publikigita en *Orienta Jin-dinastio*. (p.K 317-420), la verkinto *Gehong* tiel detale priskribis la aplikadon de la unujara artemisio:

“Kolektinte unu plenmanon da unujara artemisio kaj trempinte ĝin en du litroj da pura akvo, (elakvinte kaj) tordante ĝin, elpremi ĝian sukcon kaj eltrinki ĝin (por kuraci malarion)”.

(la kapacito de unu litro en *Orienta Jin-dinastio* pli malgrandiĝis ol tiu de nuntempa unu litro.)

Kial la verkinto *Gehong* rekomendis apliki unujaran artemision freŝa, sed ne dekoktita kiel tradicie?

Ĝuste la demando direktis esploristino *Tu Youyou* kaj ŝian esplorgrupon al la unuapaŝa ŝilosilo.

Do esploristino *Tu Youyou* kaj ŝia esplorgrupo adoptis la metodon de “malalta temperatura ekstraktado” kiel la verko sugestis.

Tiamaniere oni povas tiel taksu ke artemisinino ankaŭ estas la donaco el la spertoj kaj saĝoj de la antaŭuloj de TĈM al la nuntempa mondo.

Nuntempa prospero de TĈM en Ĉinio

Ne nur historie sed ankaŭ nuntempe, TĈM senĉese prosperas kaj daŭre kontribuas por savi vivon kaj teni sanon.

TĈM kaj TĈD nun estas ankoraŭ unu el la ĉefaj kaj gravaj rimedoj aŭ metodoj por diagnozi kaj kuraci malsanojn en TĈM-aj hospitaloj aŭ ambulatorioj.

Tiuj hospitaloj kaj ambulatorioj establiĝis kaj funkcias en ĉiuj urboj kaj urbetoj en Ĉinio, malgraŭ tieaj ekzistoj de grandaj MM-hospitaloj.

La prospero de TĈM kondiĉas la progresadon de TĈD.

La drogformo disvolviĝas grande, ke la novaj preparit-formoj esploriĝas aŭ inventiĝas: TĈD-aj tablojdo, injektaĵo, gutpiloletoj, nanometr-formo kaj ŝpruc-formo ktp..

Tiuj drogformoj egalas al tiuj de MM en aplikmetodoj, efikoj kaj konvenecoj.

La juneca vikleco de TĈM ankaŭ reflektiĝas en ĝia direktado por la nuntempa medicino.

TĈM klasifikis la malsanojn en la tri specojn antaŭ ĉ. 2000 jaroj:

“estontan malsanon”,

“baldaŭan malsanon”,

“kurantan malsanon”.

Tio signifas ke

la plej bona kuracisto povoscias kuraci la “estontan malsanon”,

la pli bona kuracisto povas kuraci la “baldaŭan malsanon”,

la bona kuracisto nur povas la“kurantan malsanon”.

La penso“kuraci estontan malsanon”,ĝis nun influas medicinojn en la mondo: direkti prevent-medicinon kaj kuracadojn de la epidemio kaj subsano.

Ĉu vi konas ke tiuj pensoj maturiĝis antaŭ du jaroj ?

Ĉu vi konas ke tiuj pensoj ĝis nun ĉiam direktas medicinajn praktikadojn.

Tiamaniere ili repruvas la sciencecon de ĉiu aserto,tezo kaj teorio de la TĈM-a sistemo.

TĈM-a santeno vaste aplikiĝas al ordinaraj popoloj

TĈM ankaŭ diskoniĝas kaj refuroras en ĉinaj socioj kaj inter ordinaraj popoloj.

TĈM-aj bazaj teorioj havas la samoriginecon kun la tradiciaj ĉinaj kulturoj,kiuj vaste kaj longtempe penetrintfluas ĉinajn popolojn.

Tio ankaŭ formas unu grandan merkaton por TĈM-aj scioj.

Diversaj komunikiloj en Ĉinio enprogramigis“Santeni perTĈM”kiel popularajn lekciojn en la televido,interreto,radio aŭ ĵurnalo ktp.,iuj el kiuj daŭras jam multajn jarojn.

Famaj profesoroj aŭ specialistoj el TĈM-aj universitatoj aŭ hospitaloj bonveniĝas ankaŭ en la tuta socio.

Ili lekcias pri kiel santeni kontraŭ tiuj oftvidataj simptomoj aŭ malsanoj per drogoj,masaĝoj,dietoj aŭ ekzercadoj ktp..

La lekciado estas profunda scie,sed facila lingve.

Kiam vi malfermas la programon de *Beijing TV stacio* matene aŭ vespere,vi certe spektos,ke famaj profesoroj aŭ specialistoj el la tuta Ĉinio (speciale el *Ĉinia Akademio de Ĉinaj Medicinaj Sciencoj*) lekcias pri la temoj.

En la ĉinaj historioj,multaj majstraj kuracistoj de TĈM ĝuis bonajn sanojn kaj vivlongecojn,kio iuflanke demonstris la intiman rilaton inter la TĈM-a santena scio kaj vivlongeco.

Do ni povas konfirmi ke TĈM estas **antikva,sed ankoraŭ juna**.Ĝi daŭre disradias junecviglon kaj plue disŝutas favoron kaj gracon al la malsanulo,subsanulo kaj sanulo.

Ni kredu kaj utiligu ĝin.

La dua parto

Kiajn gravajn rolojn (funkciojn) havas la “vivradiko” en homkorpo?

La koncepto de la “vivradiko” en TĈM.

La “vivradiko” de homkorpo estas la renoj.

La koncepto de la renoj en TĈM estas evidente diferenca el tiu en MM.

La funkcio de la renoj en TĈM estas tia ankaŭ.

La renoj en TĈM estas jen la organoj.

Ĉar ili fiziologie funkcias en urina sekreciado.

Ili estas ne la organoj.

Ĉar iliaj sistemkonsistoj kaj funkcioj en TĈM malproksime superas tiujn en MM.

Kiam ni legas la vorton “renojn” en TĈM, ni plej bone rigardas ĝin kiel la “ideogramon” por pluraj grupoj da koncernaj organ-histoj kaj iliaj fiziologiaj funkcioj en MM.

Tio estas tre grava.

La funkcioj de la renoj (en TĈM) kovras plurajn fiziologiajn statojn de la kelkaj sistemoj, diversajn movadojn de iliaj organoj kaj histoj (de MM).

Do aplikante drogojn rilate la renoj, oni povas efike interferi al nenormaj fiziologiaj statoj, reĝustigi funkciojn de organoj kaj histoj, kaj kuraci multajn malsanojn rilate la renoj en TĈM.

Tio estas tre grava por ni ilin koni kaj utiligi.

Tiuj estis la konkludoj el tiamaj “grandaj datumoj” kaj sciencaj pensadoj.

La klasikaj asertoj pri la renfunkcioj en TĈM

1. La renoj konservas la vitalesencojn.

En ĉinaj popolamasoj tradicie cirkulis la variaj diroj pri la indicoj rilate al saneco kaj vivlongeco.

“Seniliĝo komencas de la cerbo”.

“Seniliĝo komencas de la piedoj”.

“La ostoj fortiĝas, kaj tiam la sano boniĝas”.

“La okuloj kaj oreloj akriĝas, kaj tiam la sano prosperas”.

Tiuj signifas ke la cerbo kaj piedoj kiel fenestroj elmontras seniliĝajn statojn de homkorpo, kaj la ostoj, okuloj kaj oreloj kiel barometroj indikas sanecojn de homkorpo.

Fakte ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ en multaj nacioj ekzistas tiaj asertoj pri la sano kaj ĝiaj indicoj ktp..

Kial la cerbo, piedoj, ostoj, okuloj kaj oreloj havas intimajn rilatojn al la sano aŭ vivlongeco?

Eble MM havas siajn eksplikaĵojn.

Tiuj ĝuste rilatas rekte al la teorio de TĈM pri vitalesencoj, kiuj decidas sanajn alistatiĝojn de homkorpo, kio projekciiĝas ĉe la cerbo, piedoj, okuloj, oreloj kaj ostoj.

Tiamaniere alifaziĝoj de la vitalesencoj plue decidas la sanecon kaj vivlongecon.

Kio estas la vitalesencoj?

La vitalesencoj estas delikataj kvintesenecoj konservataj kaj zorgataj en la renoj, intime rilatantaj al la vivo.

Ili dominas kaj decidas vivajn formiĝon, movadon kaj disvolviĝon, regante fiziologian staton, vigecon, sanecon, kontraŭmalsanecon kaj longvivecon de homkorpo ktp..

La vitalesencoj konsistas el la du specoj: la kunnaskita kaj postnaskita vitalesencoj.

La kunnaskita vitalesenco herediĝis el gepatroj kaj konserviĝas en la renoj, kaj estas primara substanco por formi

embriojn kaj akceli iliajn kreskadojn.

Ĝuste tiu funkcio aŭ trajto ktp. faras la renojn kiel la “vivradiko”.

La postnaskita vitalesenco originis el manĝitaĵoj sub kunlaboroj de la lieno kaj pulmoj (en TĈM) .

La postnaskita vitalesenco ĉefe konserviĝas en *zangfu-organoj* kaj nutras ilin oportune.

La alia parto de ĝi transportiĝas al la renoj por kombini la kunnaskitan vitalesencon, suplemente nutrante kaj senĉese refreŝigante ĝin.

La kunnaskita kaj postnaskita vitalesencoj en la renoj nomiĝas la “renesencoj”.

(En TĈM, *zangfu-organoj* konsistas el *zang-organoj* kaj *fu-organoj*. *zang-organoj* inkludas la koron, hepaton, lienon, pulmojn, enojn kaj *fu-organoj* inkludas la maldikan inteston, dikan inteston, urinvezikon, stomakon, galvezikon kaj *san-ĝao-on*.)

(En TĈM, *san-ĝao-o* (*tri-ĝiao-o*) estas iu parto de korptorso anstataŭ organo de MM) .

1.1 La rilatoj inter renesencoj kaj la feto

Konkrete renesencoj povas decidi aŭ domini kunnaskitajn konstituciojn, fiziologiajn kaj intelektajn karakterojn (kiel fortecon, sanecon, sangtipon, intelekt-kvocienton kaj aspektan trajton ktp.) .

Se renesencoj de gepatroj (speciale patrino) estas plenaj, sanaj kaj viglaj, tio faros renesencojn de iliaj fetoj ankaŭ plenaj, sanaj kaj viglaj.

Do iliaj fetoj estos sanaj kaj viglaj.

Tiu teorio ŝajnus esti la antaŭulo de la nuntempa gendoktrino, nur sen la terminoj de DNA kaj RNA (tRNA, mRNA, rRNA) .

Do se oni volas havi sanajn fetojn, ili devas bone santeni la renojn, tonikumante aŭ nutrante ilin.

1.2 La rilato inter renesencoj kaj la bebo (infano)

Krom la feto, renesencoj ankaŭ povas parte decidi aŭ domini sanecon, malsaniĝon kaj kontraŭmalsanecon de la bebo.

Homkorpo dum la infaneco nature tendencas kreski aŭ disvolviĝi, kvazaŭ la juna arbo faras en printempo.

En tiu vivperiodo, se renesencoj asteniĝas, la jenaj simptomoj aŭ malsanoj (sindromoj) aperas: karenform-brusto, ĝibo, febleco, nevigleco, litpisemo, salivumo, mallonga aŭ nesimetria korpo, “kvin tardecoj” (unua-stariĝa tardeco, unua-pied-iriĝa tardeco, unua-paroliĝa tardeco, dent-ekkreska tardeco kaj harar-ekkreska tardeco), “kvin molecoj” (fontanela moleco, buŝa moleco, mana moleco, pieda moleco kaj muskola moleco) ktp.

Tiuj beboj rare vidiĝas en la nuntempa mondo, escepte de malriĉaj zonoj aŭ landoj. Kompreneble eĉ en riĉaj landoj, se gepatroj estas feblaj kaj nesanaĵaj, iliaj idoj eblas suferi kunnaskitan renesenc-astension ankaŭ.

TĈM povas elkuraci renesenc-astenojn per rentonikumaj drogoj, kaj samtempe reĝustigi la funkciojn de tiroid-glando, kio montras al ni, ke la efikmekanismo de la drogoj eble havas la similan parton al tiu de MM.

1.3 La rilato inter renesencoj kaj la plenaĝulo

Sanaj problemoj de la plenaĝulo eble aparte estas gener-kapabloj. Renesencoj havas la funkcion domini generkapablon.

Laŭ TĈM, la renesencoj ŝajnas “iniciatintoj” kaj endogenaj reĝustigiloj por kresko kaj maturiĝo de seks-generaj funkcioj de junul-plenaĝuloj.

Pri tio, la klasika verkego de TĈM “*Huangdi Klasikaĵo pri Interna Medicino*” vivece desegnis la alistatiĝajn rilatojn inter la renesencoj kaj seks-generaj funkcioj.

“Por la virino, kiam en la aĝo de sep jaroj *ren-ci-o* abundas, ŝiaj dentoj ŝanĝiĝas, kaj hararo longiĝas; kiam en la aĝo de dek kvar jaroj *tiangui-esenco* formiĝas, *ren-ĝin-kanalo* trairiĝas, kaj *taichong-ĝin-kanala ci-o* ekfloras, ŝia menstruo tajdofluigas kaj ŝi povas gravediĝi.”

“Por la viro, kiam en la aĝo de ok jaroj *ren-ci-o* pleniĝas, liaj dentoj ŝanĝiĝas kaj hararo longiĝas; kiam en la aĝo de dek ses jaroj *ren-ci-o* floras, *tiangui-esenco* formiĝas, liaj spermatozoidoj kaj *gener-ci-o* eksuperfluigas, kaj geiĝante

kun la virino,li havos idon.”

(*ren-ci-o* transformiĝis el renesencoj kaj signifas la ren-funkciojn.*Gener-ci-o* signifas la generkapablon ktp..)

La plej frua supozo pri sekshormono antaŭ ĉ.2000 jaroj.

Kio estas *tiangui-esenco*?

Tiangui-esenco funkcias kiel seksa hormono aŭ koncerna fiziologia aktiveca materialo en MM.

Por la virino,*tiangui-esenco* funkcias kiel la virinseksa hormono ktp..

Por la viro,*tiangui-esenco* funkcias kiel la virseksa hormono ktp..

Do en la antikva Ĉinio (antaŭ ĉ.2000 jaroj) ,antaŭuloj jam perceptis la ekzistojn de la fiziologiaj aktivecaj materialoj.

Tio mem estas mirinda.

Se renesencoj estas nek plenaj,nek viglaj,tio prokrastas aŭ baras normajn formiĝon kaj maturiĝon de la seksorganoj.

Do tiuj plenaĝuloj kun renesencaj neplenoj kaj nevigloj taŭgas ne por koiti kaj generi.

Aplikante drogojn tonikumi la renojn,TĈM povas efike kuraci ilin,kio jam fariĝis unu el la plej sukcesaj kaj maturaj kuracmetodoj.

Tiu fruseniliĝo de la plenaĝulo povas ankaŭ esti efike moderata de rentonikumaj drogoj.

1.4 Renesencoj kaj la maljunulo

Por la maljunulo,sano kaj vivlongeco devas esti la plej zorgindaj problemoj.

La maljuno estas la finkrepusko de la tuta vivo,kaj tiam ili ĝenerale estas nefortaj kaj kadukaj.

Kial?

Kiel“iniciatintoj”kaj endogenaj reĝustigiloj por la tuta viv-proceso,la renesencoj de la maljunulo nature velkas kaj preskaŭ elĉerpiĝas.

Laŭ“*Huangdi Klasikaĵo pri Interna Medicino*”,“por la virino,...kiam en la aĝo de kvardek naŭ jaroj *ren-ĝ in-kanaloj* asteniĝas,*taichong-ĝin-kanaloj* krepuskiĝas,kaj *tiangui-esenco* elĉerpiĝas,ŝia seksorgano fermiĝas kaj la korpo kadukas,kaj ŝi perdas generkapablon.”

(*ren-ci-o* transformiĝis el renesencoj kaj funkcias kiel ilia homologeco.)

“Por la viro,...kiam en la aĝo de sesdek kvar jaroj *tianguiesenco* elĉerpiĝas,renesencoj mankas,liaj renoj degeneras kaj la tuta korpo jam forkonsumiĝas maksimume.”

Tiu aserto desegnis la homkorpajn velkojn dum la fina vivetapoj,antaŭ ĉ.2000 jaroj,kaj tiam la popoloj eble havis pli mallongajn vivlongecojn ol tiuj en la nunerao.

Ĉiu devos seniliĝi,tio estas la natura leĝo.Tamen iuj seniliĝas frue kaj la aliaj malfrue.

La kaŭzo estas tre klara.

Ren-ci-a asteniĝo jus pli malrapidas,vivlongeco des pli longiĝas.

Ren-ci-o funkcias kiel homologeco de la renesencoj.

Kiam kunnaskita renesenco asteniĝas frue kaj dume sen sufiĉa replenigo de postnaskita vitalesenco,seniliĝo alvenos pli frue.

Se inverse,seniliĝo proksimiĝos lante.

Laŭ diferencaj astenioj de la renoj,TĈM aplikas koncernajn drogojn.

(1)